

AMERIKA ESPERANTISTO

AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



*Esperanto Broadcasts
Kennedy & U.S.A.*

*Program of March 17th
Voice of America*

*Esperanto in Action
Around the World*

*La Kanto pri Hivata
Kanto N-ro VIII*

1

1961



AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

Official publication of the

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

114 West 16 St., New York 11, N. Y.

Central Office: Doris T. Connor, George Alan Connor, Myron R. Mychajliw

Sustaining Board: Ralph H. Beard, Dr. Luella K. Beecher, A. M. Brya, Joseph H. Casto, C. Cummingsmith, Dr. Lee-Min Han, Austin Herschel, Allan Hutcheon, J. Archie Johnson, Jr., Paul J. Kovar, Bertha E. Mullin, Anonymous, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan.

CONVENTION BOUND ?

The 50th "Golden Jubilee" Congress of EANA

At MSM College in Rolla, Mo. (near St. Louis)

June 2nd, 3rd, 4th, 1961 - MSM Esperanto Club

The young engineers and students of the MOSAMO Esperanto Club at the *Missouri School of Mines and Metallurgy* in Rolla, Missouri, will be hosts to the *Golden Jubilee Congress* during the week end of June 2nd, 3rd, 4th, this year. Grand events - discussions, banquet, music, practice sessions, etc. - will all be held in the new *Student Union Building* of the college. MOSAMO is a guarantee of most friendly and most constructive participation for all Esperantists. And all who are interested in Esperanto are invited, regardless of affiliation or non-affiliation. A Congress Ticket costs only \$3.00. Rolla is a delightful college town, about two hours ride west of St. Louis. Rolla is very near to the center of population for the United States, and it is hoped that *all* Esperantists who can possibly do so will attend this happy occasion. Further details are printed in a special Congress Bulletin; but send your \$3 *at once* to support the Congress, whether you become a "participant-in-person" or a "participant-by-mail". All who contribute to the Congress will be honored as members of the Congress, and will receive information and reports on the events. Send your \$3 at once to EANA in New York.

Cover picture: Photo of President Kennedy from "U. S. News & World Report".

"The Association will not knowingly admit as members persons who are Communists or Fascists or others who seek to overthrow the Government of, or in the interests of a foreign power seek to weaken, the United States, or to change its form of government by other than constitutional means." - EANA Constitution.

Subscriptions in the United States and Canada: \$3.00 per year.

Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.

Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA - \$5.00 per year. Patron - \$10.00.

H. S. or College Student & Armed Forces - \$3.00 per year.

Sustaining Board - \$3.00 or more per month.

AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 74

MARTO 1961

N-ro 1

ESPERANTO-PROGRAMOJ DE LA VOĈO DE AMERIKO PRI USONO SUB PREZIDANTO KENNEDY

Je la kvara fojo la Voĉo de Ameriko dissendos serion da radio-programoj en Esperanto la 17-an, 24-an kaj 31-an de Marto kaj la 7-an de Aprilo 1961. En logika daŭrigo de la tria serio, kiu pritraktis la elektojn, la kvara serio donos bildon de Usono sub la nova Prezidanto John Fitzgerald Kennedy. Sonbildoj de gravaj okazaĵoj, raportoj, intervjuoj kaj la bone konata rubriko de Demandoj kaj Respondoj ilustras la bazan idearon, la programon kaj la gvidantajn personojn de la Kennedy-registaro kaj klarigos la rolon de la Prezidanto, de liaj ĉefaj kunlaborantoj, de la Kongreso, de la tribunaloj kaj de aliaj gravaj institucioj, ankaŭ la signifon de la Respublikana opozicio.

Por atingi diversajn partojn de la mondo, ĉiu el la kvar 30-minutaj programoj estos disaŭdigata kvarfoje: je 3.30 h. (laŭ la horsistemo de Greenwich) sur ondlongoj de 19.83 kaj 16.92 metroj (15130 kaj 17735 kilocikloj), ĉefe por Suda, Centra kaj Norda Ameriko (je 9.30 h. jaŭde vespere laŭ loka tempo en Meksiko, Gvatemalo, Centra Usono kaj Kanado, je la 10.30 h. en Kubo kaj orientaj partoj de Usono kaj Kanado, je la duono post noktmezo en Argentino kaj Brazilo); je 11.00 h. (la 8-a vespere vendrede en Japanujo) sur ondlongo de 41.92 m (7155 kcs), ĉefe por Orienta Azio; je 12.00 (la 7-a kaj duono vespere en Indonezio) sur ondlongo de 19.72 m (15210 kcs), ĉefe por Sudorienta Azio; je 22.00 h. (la 11-a vespere en la plimulto de eŭropaj landoj) sur ondlongoj de 31.20 kaj 48.62 m (9615 kaj 6170 kcs), ĉefe por Eŭropo kaj apudaj regionoj de Azio kaj Afriko. Ĉiuj elsendoj estos aŭdeblaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

Raportojn pri la ricevo kaj opiniesprimojn pri la enhavo bonvolu sendi al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D. C., Usono.

VOICE OF AMERICA BROADCAST IN ESPERANTO

(This is the major part of a Voice of America program in Esperanto broadcast March 17 from Delano, Okinawa, Manila, and Tangier.)

Announcer: La Voĉo de Ameriko parolas el Washington. Ni prezentas programon en Esperanto.

La dudekan de Januaro John Fitzgerald Kennedy fariĝis la tridekkvina Prezidanto de Usono. Daŭrigante la serion pri la elektoj, la Voĉo de Ameriko elsendos kvar programojn pri la Kennedy-registaro. Hodiaŭ, en raporto pri la membroj de tiu registaro, vi aŭdos la voĉojn de Prezidanto Kennedy, Ŝtata Sekretario Dean Rusk kaj UNO-Ambasadoro Adlai Stevenson. Rubriko de Demandoj kaj Respondoj informos pri la agado de la nova registaro rilate al la problemo de senlaboreco, al Latinameriko, precipe Kubo, kaj al Laoso. Demandoj pri tiuj temoj venis el Bolivio, Brazilo, Britujo, Ĉilio, Danujo, Francujo, Germanujo, Jugoslavujo, Kamboĝo, Koreo, Kubo, Luksemburgo, Monako, Novzelando, Svedujo kaj Urugvajo.

Kiel speciala gasto aperos Membro de la Domo de Reprezentantoj,

Kongresano Roman Pucinski el Chicago. Li respondos al demando de Membro de la Sveda Senato, Einar Dahl.

Jen la voĉo de Prezidanto Kennedy, faranta sian Inaŭguran Paroladon:

President Kennedy: Let the word go forth from this time and place, to friend and foe alike, that the torch has been passed to a new generation of Americans – born in this century, tempered by war (*fade slowly*), disciplined by a hard and bitter peace, proud of our ancient heritage

Voice: Amikoj kaj malamikoj sciuj, ke la torĉo transiris al nova generacio de amerikanoj – naskitaj en nia jarcento, harditaj en la milito, disciplinitaj en malmola kaj maldolĉa paco, fieraj pri sia malnova heredaĵo –, kiuj ne estas pretaj vidi aŭ permesi malrapidan pereon de tiuj homrajtoj, al kiuj nia nacio ĉiam estis dediĉita kaj al kiuj ni estas dediĉitaj nun, en nia propra lando kaj ĉie en la mondo.

Narrator: Prezidanto Kennedy vokis al internacia kunlaboro, al atako kontraŭ la veraj malamikoj de la homaro, tiraneco, mizero, malsano kaj milito. Turnante sin ne nur al ĉiuj usonanoj, sed ankaŭ al tiuj, kiujn li nomis “civitanoj de la mondo”, li diris:

President Kennedy: And so, my fellow Americans: Ask not what your country can do for you – ask what you can do for your country. My fellow citizens of the world: Ask not what America will do for you, but what together we can do for the freedom of man. (*fading out*)

Voice: Miaj usonaj samnacionoj: Demandu, ne kion via lando povas fari por vi, sed kion vi povas fari por via lando. Miaj kuncivitanoj de la mondo: Demandu, ne kion Usono povas fari por vi, sed kion ni kune povas fari por homa libereco.

Narrator: Pasis jam preskaŭ du monatoj de la Inaŭgura Tago. Dum tiu tempo oni rimarkis en la aero de Washington ion, kion unu observanto nomis “la elektreco de ideoj”. La Prezidanto ĉirkaŭis sin per junaj, viglaj kaj energiaj homoj kaj petis konsilojn de kelkaj el la plej spertaj kaj kuraĝaj fakuloj en Usono. Jam antaŭ la dudeka de Januaro grupoj da specialistoj preparis raportojn pri urĝaj problemoj kaj eblaj metodoj por ilia solvo.

El la dek membroj de la Kabineto la plej juna estas 35-jara, la plej maljuna 62-jara. La meza aĝo estas 47 jaroj. Sed la ministroj kaj aliaj kunlaborantoj de Prezidanto Kennedy estas ne nur junaj kaj agemaj, sed ankaŭ spertaj en multaj fakoj. La Ŝtata Sekretario – en aliaj landoj oni nomus lin Ministro de Eksterlandaj Aferoj –, 51-jara Dean Rusk, estis Prezidanto de la fama Rockefeller-Fondaĵo, kiam Sinjoro Kennedy proponis al li la postenon. Li okupis gravajn registarajn oficojn sub Prezidanto Roosevelt kaj Prezidanto Truman. Li studis en Oxford, Britujo, kiel Rhodes-stipendulo. Dum la Dua Mondmilito li plenumis gravajn taskojn en Hindujo, post la milito en Japanujo kaj en la usona delegitaro al la Unuigitaj Nacioj. En 1933, kiel studento en Oxford, li ricevis la Cecil-Pac-Premion.

En gazetara konferenco Ŝtata Sekretario Rusk atentigis, kiel grava kaj malfacila estas la problemoj de la rilatoj al la Soveta Unuiĝo:

Secretary Rusk: There is a lot of work to do to find out whether it is possible to find a constructive relationship, step by step, issue by issue with the Soviet Union, (*fade out*) and indeed with others

Voice: Necesas multe da laboro por vidi, ĉu estas eble trovi – paŝo post paŝo, problemoj post problemoj – pozitivajn rilatojn al la Soveta Unuiĝo kaj al aliaj landoj.

Narrator: Pri helpo al la nove evoluantaj landoj Sekretario Rusk diris:

Secretary Rusk: Well, what is needed is inspirational leadership and (*fade out*) an activation of the development forces that are coming

Voice: Necesas inspira gvidado kaj aktivigo de la fortoj de evoluo venantaj de malsupre. Tio ebligas progreson sur larĝa fronto. Oni devas

trovi iujn punktojn — eĉ se ili ŝajnas esti malgravaj — en kiuj nia helpo povas havi decidan influon, ... ekzemple en la evoluigo de novaj specoj de baza nutraĵo, en la edukado de geoficistoj por publika administrado, ... en la starigo de bona universitato aŭ en la havigo de kapitalo por tute urĝa projekto, kiu promesas gravan rezulton. Tiel ni povas helpi la bazan evoluon interne de tiuj landoj.

Narrator: Ne nur Sinjoro Rusk, sed ankaŭ la aliaj gvidantoj en la nuna Ŝtata Departemento reprezentas eksterordinaran trezoron de inteligenteco, originala pensado kaj solida sperto. La Vicministro, Chester Bowles, akiris famon kiel Ŝtatestro de Connecticut, Ambasadoro en Hindujo kaj aŭtoro de brilaj kaj pensigaj libroj pri mondaferoj. Averell Harriman, Speciala Vojaĝanta Ambasadoro de Prezidanto Kennedy, servis dum la milito kiel Ambasadoro de Prezidanto Roosevelt en Moskvo, poste kiel Ambasadoro en London kaj Ministro de Komercio sub Prezidanto Truman, fine kiel Ŝtatestro de New York. La brila eks-Ŝtatestro de Michigan, Mennen Williams, nun estas Helpa Ŝtata Sekretario por Afrikaj Aferoj.

Eksterordinare gravan taskon akceptis la nova Usona Ĉefdelegito en la Unuigitaj Nacioj, Ambasadoro Adlai Stevenson. Dufoje li estis la kandidato de la Demokrata Partio al la Prezidanta ofico. En 1945 li kunlaboris en la starigo de la Unuigitaj Nacioj en la Konferenco de San Francisco. Li servis kiel Ŝtatestro de Illinois. Liaj paroladoj kaj libroj, plenaj de saĝeco kaj sprito, estas famaj en la tuta mondo. En sia UNO-posteno Ambasadoro Stevenson donas specialan atenton al la novaj nacioj, kiuj nur antaŭ nelonge eliris el la kolonia stato kaj atingis sendependecon kaj membrecon en la mondorganizo. En sia unua parolado en la Sekureca Konsilantaro de UNO Ambasadoro Stevenson diris:

Ambassador Adlai Stevenson: First, we know the importance which the newer and less developed nations attach to the UN. In their search for peace, for mutual tolerance, for economic development (*fade out slowly*), for dignity and self-respect, our interest is theirs.

Voice: Ni konas la gravecon, kiun la novaj kaj malpli evoluintaj nacioj atribuas al UNO. En ilia serĉado de paco, reciproka toleremo, ekonomia evoluo, homa indeco kaj memrespekto ilia intereso estas nia. Ni ne serĉas militajn aliancantojn inter ili, kaj ni ne deziras surmeti al ili nian sistemon aŭ nian ideologion. Tio cetere estus tute neebla. Libereco ne povas esti surmetata al iu ajn. Nia zorgo estas, ke tiuj nacioj estu vere sendependaj membroj de paca familio de nacioj. Estante la plej malnova kontraŭkolonia potenco, Usono favoras liberecon kaj la rajton de memdecido por ĉiuj nacioj. Nin ĝojigas la rapida kaj paca revolucio, kiu naskis tiom da suverenaj nacioj kaj kondukis ilin en nian rondon.

Narrator: Tiel parolis en la Sidejo de la UNO Ambasadoro Adlai Stevenson, esprimante la celon kaj la sintenon de la Kennedy-registaro.

Announcer: Vi aŭdis programon pri "La Novaj Homoj en Washington". En la venonta semajno ni parolos pri la ideoj de la Kennedy-registaro, kies voko al pionira agado aŭdiĝas sub la devizo: "La Nova Limo". Aŭskultu nun programon de

Demandoj kaj Respondoj pri la Kennedy-Registaro

Announcer: Membro de la Unua Ĉambro de la Sveda Parlamento, Senatano Einar Dahl, esprimante plezuron pri la daŭrigo de la Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko, sendis al ni jenan demandon:

"La problemo de senlaboreco verŝajne estas grava en Usono. De ĝia ĝusta solvo dependas la feliĉa vivo de milionoj da homoj. Kion Prezidanto Kennedy volas fari por forigi la senlaborecon?"

Solzbacher: Por respondi al tiu demando, ni havas la honoron bonvenigi antaŭ nia mikrofono eminentan Membron de la Domo de Reprezentantoj,

Kongresanon Roman Pucinski el Chicago. Li estas membro de la Komitato pri Edukado kaj Laboro. Antaŭ nelonge li akompanis la Laborministron Arthur Goldberg dum parto de vojaĝo al la ĉefaj krizaj regionoj. Sinjoro Goldberg faris tiun vojaĝon laŭ peto de Prezidanto Kennedy por ekzameni la faktojn pri la ekzistanta senlaboreco kaj por proponi efikajn mezurojn por la solvo de la problemo. — Saluton, Kongresano Pucinski!

Congressman Pucinski: Saluton! Jes, mi akompanis Sekretarion Goldberg, kiu—kiel mi—estas el Chicago. Prezidanto Kennedy iniciatis agadon en du frontoj: Unu estas helpo al senlaboruloj kaj iliaj familioj. La alia estas stimulado de ekonomia kresko. Speciala agado estas necesa en la krizaj regionoj, kiuj suferas rezulte de ŝanĝo en ilia ekonomia bazo.

Solzbacher: La daŭrigon de la respondo al Senatano Dahl legos Fraŭlino Clare Soponis, sekretariino de Kongresano Pucinski.

Clare Soponis: En sia parolado pri la stato de la nacio Prezidanto Kennedy diris: "Ni ne povas permesi al ni la lukson, malŝpari neuzatajn laborhorojn kaj fabrikejojn... Ni devas montri al la mondo, kion libera ekonomio povas fari por malpligrandigi la senlaborecon, pligrandigi la produktadon kaj plirapidigi la kreskon de la ekonomio." La Prezidanto sendis al la Kongreso diversajn proponojn por tiucelaj leĝoj. Li ankaŭ uzis sian propran ekzekutivan potencon. Lia unua dekreto, eldonita la tagon de lia Inaŭguro, adresita al la Sekretario de Agrikulturo, ordonis duobligon de la kvanto de nutraĵoj disdonataj senpage al personoj bezonantaj tian helpon, precipe en la krizaj regionoj.

Prezidanto Kennedy urĝe rekomendis plibonigon de nia sistemo de asekuro kontraŭ senlaboreco. Li proponis plilongigon de la periodo, dum kiu senlaboruloj povas ricevi pagon el la asekura kaso kaj starigon de tutlandaj reguloj pri la asekuro. Nuntempe la reguloj varias de unu Ŝtato al la alia. Mezuroj por definitiva kaj daŭra plirapidigo de la kresko de la usona ekonomio nun estas en preparo.

Solzbacher: Leĝopropono por helpo al la krizaj regionoj jam estas submetita al la Kongreso, ĉu ne, Kongresano Pucinski?

Congressman Pucinski: Jes, Senata Propono Numero Unu de mia bona amiko, Senatano Douglas de Illinois. Li estris komitaton, kiun Prezidanto Kennedy nomis por studi la problemon kaj proponi praktikajn rimedojn.

Solzbacher: Jen bona respondo al la demando de la sveda Senatano.

Congressman Pucinski: Dankon al vi, Senatano Dahl, pro via demando kaj pro via intereso al la Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko.

Solzbacher: Kaj dankon al vi, Kongresano Pucinski, nome de niaj aŭskultantoj en la tuta mondo. Ili rimarkos, ke Kongresano Roman Pucinski el Chicago aperas jam la 3-an fojon en nia programo, parolante en Esperanto.

Ni esperas, ke la respondo ankaŭ taŭgas por informi aliajn aŭskultantojn, kiuj sendis al ni demandojn pri la sama temo. Ili estas Sinjoro Manuel Solé el Ĉilio, Maguín Zubieta el Bolivio, Arlindo Reis el Brazilo, Dinh Thuan My el Kambogo, Jyung Gil Jyung el Koreo, David MacGill el Novzelando, Louis Vannini el Monako, Nicolas Colling el Luksemburgo, Oskar Breddermann el Germanujo kaj Jean Guillaume el Francujo.

Eble ni devus klarigi al kelkaj el ili, ke senlaboreco estas problemo en kelkaj partoj de Usono, ne en la tuta lando. Multaj el la senlaboruloj povus trovi laboron en aliaj urboj en Usono, sed pro diversaj kialoj ne povas aŭ ne volas foriri el sia hejma regiono.

Iuj aŭskultantoj demandis pri la rolo de publikaj laboroj en la forigo de la senlaboreco. Eĉ antaŭ la ellaboro de novaj programoj Prezidanto Kennedy ordonis la plirapidigon de publikaj laboroj jam aprobitaj kaj urĝe rekomendis similajn mezurojn al la Ŝtatestroj de la kvindek Ŝtatoj.

Pri la sinteno de Prezidanto Kennedy al la Latinamerikaj nacioj, pre-

cipe al Kubo, ni ricevis demandojn de Profesoro Manuel Fernández Menéndez el Urugvajo, Sinjoro Jorge Soares das Neves el Brazilo, Sinjoro Ivo Osibov el Jugoslavujo, Fraŭlino Marjorie Boulton el Britujo – kaj ankaŭ de aŭskultanto en Kubo.

En sia Inaŭgura Parolado Prezidanto Kennedy diris: “Al la frataj Respublikoj sude de nia landlimo ni faras specialan promeson: konverti niajn bonajn vortojn en bonajn agojn en nova alianco por la progreso, helpi liberajn homojn kaj liberajn naciojn forĵeti la katenojn de la malriĉeco. Sed tiu paca revolucio de la espero ne devas fariĝi viktimo de malamikaj potencoj. Ĉiuj niaj najbaroj sciu, ke ni unuiĝos kun ili en kontraŭstaro al atako aŭ subfosa agado ie en la Amerika kontinento. Ĉiuj aliaj potencoj sciu, ke nia duonsfero intencas resti estro de sia propra domo.”

Pri Kubo Prezidanto Kennedy diris en unu el siaj gazetaraj konferencoj: “Usono kaj ĉi tiu registaro havas grandegan intereson pri Latinamerikaj movadoj celantaj pli bonan vivon por la popolo. Se niaj propraj interesoj eble suferas rezulte de tia movado aŭ tia revolucio . . . , ni opinias, ke tio estas afero, pri kiu oni devas intertrakti . . . Tamen ni sentas zorgon, kiam tiaj movadoj estas transprenataj de eksteraj fortoj, kiuj ne direktas ilin al plibonigo de la popola bonfarto, sed uzas ilin por surmeti ideologion fremdan al nia duonsfero. Mi esperas, ke en la tuta kontinento registaroj estos starigataj, kiuj – (mi opinias, ke preskaŭ ĉiuj registaroj nun ekzistantaj jam faras tion) – do kiuj pensas same kiel ni, ke estas necese, havigi al la popoloj de la Amerika kontinento pli bonan vivon. Ni multe pensas pri tio, kaj la usona politiko iros al tiu celo. Sed estas malfacile havi feliĉajn rilatojn kun lando, en kiu paca revolucio estas alproprigata de eksteruloj, kiuj uzas ĝin por siaj propraj celoj.”

Prezidanto Kennedy klarigis, ke en la nuna momento Usono ne intencas restarigi diplomatajn rilatojn kun Kubo.

En alia parto de la mondo Laoso prezentas danĝeran situacion. Pri tiu temo ni ricevis du demandojn en Esperanto. Unu venas de Sinjoro Dinh Thuan My en Phnom-Penh, la ĉefurbo de Kamboĝo, kiu demandas: “Kia estus la sinteno de Usono, se Laoso dezirus sekvi politikon de neŭtraleco?”

La aktuala situacio en Laoso ankaŭ estas menciata en letero de Erik Larsen el Fredericia, Danujo.


Al demando pri Laoso Prezidanto Kennedy respondis en unu el siaj gazetaraj konferencoj. Li diris: “La situacio en Laoso multe interesas nin. Usono forte deziras, ke Laoso estu paca lando, sendependa lando, ne superregata de iu flanko. Ni deziras, ke la registaro de Laoso okupiĝu pri la vivo de la popolo en la lando . . . Usono uzas sian influon por ebligi ke sendependa lando, paca lando, neŭtrala lando estu starigata post la nunaj tre malfacilaj cirkonstancoj.”

Sinceran dankon al la multaj aŭskultantoj, kiuj skribis al ni kaj sendis demandojn, ankaŭ al tiuj, kies nomojn ni ne povis uzi.

Announcer: Aŭskultu nin denove la venontan vendredon, kiam la Voĉo de Ameriko prezentos programon en Esperanto pri la celoj kaj ideoj de la Kennedy-registaro kaj alian programon de Demandoj kaj Respondoj.

Editor's Note: The use of Esperanto for worldwide broadcasting by the Voice of America is a notable experiment. These excerpts from a VOA broadcast are printed to give our readers an idea of how the programs are presented. The views expressed are those of the new Democratic administration, of course, and do not necessarily represent the opinions of the American Esperanto Magazine.

ESPERANTO IN ACTION AROUND THE WORLD



The Third International Conference of People's Colleges, held at Strasbourg, France, in the second week of September 1960, discussed repeatedly the advantages of Esperanto. Its Committee on Youth and Cultural Centers recommended the organization of study tours abroad, "preceded by the study of languages, especially Esperanto, which constitutes an excellent means of international understanding." In the opening session of the conference, M. Pierre Petit, of France, President of the European Association of People's Colleges, mentioned the success of the Coordinated Esperanto Classes organized in a substantial number of European people's colleges at the initiative of Dr. Tina Peter-Ruetschi, of the People's College of Zurich, Switzerland. People's colleges and adult education centers in Finland, Yugoslavia, Germany, Switzerland, Italy, and France have participated in the project.

The Lebanese Esperanto Association, established in 1960, is now sponsoring two Esperanto classes, with 78 students, in Beirut. The President of the organization, Professor Adib Saad, teaches at the American University of Beirut.

Lord Boyd Orr, who served as the first Director General of the United Nations Food and Agriculture Organization (FAO) from 1945 to 1948, and was awarded the Nobel Peace Prize in 1949, has accepted the honorary protectorate over the 46th Universal Esperanto Congress, scheduled to be held at the British summer resort and conference center of Harrogate, Yorkshire, in August 1961.

A church bell recently installed in Stockum, Germany, carries the inscription, "*Glory to God – Peace on Earth,*" in Esperanto.

The French Minister of Information, Louis Terrenoire, at the Esperanto Congress of Normandy, at Domfront, declared: "Esperanto is a great hope. How much easier would everything be for the Big Four who decide the destiny of the world if they had a common language!"

On the Capitol in Rome a ceremony honoring the memory of Dr. L. L. Zamenhof, author of Esperanto, was held on November 24, 1960. Those present included the British Ambassador, the Ambassadors of Colombia, Peru, and Poland, as well as numerous representatives of the Esperanto movement. The Italian Ministers of Education, Justice, National Defense, and Merchant Shipping sent telegrams of greeting.

An example of the use of Esperanto for political information and propaganda is a 62-page pamphlet on the South Tyrol problem – written from the Austrian point of view. Copies were sent to all Foreign Ministries and to all United Nations delegations in New York.

Streets named after Esperanto or after Dr. L. L. Zamenhof, author of the language, now exist in more than 150 cities in at least 30 countries. Recent additions to the list include: Rome, Alessandria, Mirandola, Ragusa, and Reggio Emilia, Italy; Hamburg, Stuttgart, and Karlsruhe, German Federal Republic; Baugé, Bourg-de-Péage, and Montreuil-Belfroy, France; Natal, Nilópolis, Campinas, Sorocaba, and Feira de Santana, Brazil; Sofia, Plovdiv, Varna, Asenovgrad, Slavjanovo, Kazanlak, Pazardjik, Polski Trambes, and Govedarci, Bulgaria; Warsaw, Torun, Ostrow, Radom, Siedlce, Slupsk, and Gora Slaska, Poland; Linz and Wienerneustadt, Austria; Valencia, Cheste, and Sabadell, Spain; Anderlecht, Belgium; and Three Rivers, Canada. The countries having the largest number of such Esperanto Streets as well as Zamenhof Streets are France and Brazil.

In the Malagasy Republic (Madagascar) Esperanto classes are being taught at the headquarters of the Chamber of Commerce of Tananarive, the capital of the island. About 80 beginners and 15 advanced students are enrolled.

An International School Exhibition, held at Dortmund, West Germany, in November 1960, included an Esperanto Section. The program featured — among many other things — an Esperanto demonstration and a lecture on "The Teaching of Esperanto in the School of Tomorrow" by the President of the German Esperanto Association, E. Schoen, a retired high school principal.

Postage stamps honoring the centennial of the birth of Dr. L. L. Zamenhof, author of Esperanto, were issued in the past two years by Poland, Bulgaria, and Brazil.

The International Trade Fair of Poznan, Poland, began to use Esperanto in 1960.

A booklet about William Penn was published by the Quaker Esperanto Society, which has headquarters in England. The author is Dr. Edmond Privat, Professor of English Language and Literature at the University of Neuchâtel, Switzerland. The booklet discusses in particular William Penn's proposal for a European Parliament.

Oedipus Rex and Antigone, two classical Greek tragedies by Sophocles, have appeared in an Esperanto translation, with introduction and comments, by the British scholar, Douglas B. Gregor. The book was published in the Canary Islands. The Esperanto title is "*Reĝo Edipo kaj Antigone*." Available from EANA at \$2.20 postpaid.

At a Catholic teachers' college in Chapecó, Brazil, Esperanto is being taught in three classes twice a week. The college also sponsors a local radio program, which for a period of two months featured a weekly ten-minute Esperanto program prepared by the students.

The Fellowship of British Christian Esperantists has started preparations for an International Christian Esperanto Congress to be held at the Hockering Training College of the Church of England, at Bishop's Stortford, Hertfordshire, from July 29 to August 5, 1961.

"The Other Chap" is the title of an article by John W. Leslie, in the December 1960 issue of *Friendship News*, a publication of the International Friendship League in England. The author points out that it is essential in people-to-people contact to "meet the other chap halfway" and that this can be done by using Esperanto. He explains: "The positive part that Esperanto has played in building up friendship and understanding between the peoples of the world is no idle, unfounded boast. The worldwide organization UNESCO, after due investigation and consideration, passed an important resolution on the subject of Esperanto in December 1954, which stated, *inter alia*, that it 'takes note of the results attained by Esperanto in the field of international intellectual relations and in the rapprochement of the peoples of the world.' In other words, the other chap is catered for by Esperanto. UNESCO has taken matters a little further now, because it has named Dr. Zamenhof (born December 15, 1859), the author of Esperanto, as one of the 'great personalities' whose anniversary is to be celebrated this year, and calling upon the governments of the Member-States to follow suit... Some are content to remain in their mentally walled-off hermit's cell. That is their business, of course, but for others Esperanto is there whenever they care to take it and use it."

Rabindranath Tagore, the great Indian writer, poet, and philosopher, and winner of the 1913 Nobel Prize for Literature, is now being honored in his native land and all over the world during the centennial of his birth. In this anniversary year of 1961, a volume of his short stories, translated from the original Bengali into Esperanto by Lakshmisvar Sinha and illustrated by the Indian artist Sukhamoy Mitra, is being published in Sweden under the title *Malsata Ŝtono* ("The Hunger Stone").

In Godthaab, the capital of Greenland, an Esperanto class is now being taught by Georg Kustoscz. Those enrolled include a number of teachers.

Schools for the blind in a number of countries are teaching Esperanto. In some of them Esperanto classes are a compulsory part of the curriculum, for instance at the Royal Normal College for the Blind in England, the Instituto Benjamin Constant in Brazil, and the Dalen Off. Skole for Blinde in Norway. Schools for the blind at which Esperanto is taught on an optional basis include those of Villeurbanne near Lyon, France, and of Tomtebodavägen near Stockholm, Sweden. In the USA, Esperanto is taught in correspondence courses of the Hadley School for the Blind, located at Winnetka, Illinois. At present the instructor is Miss Claudette Toro of San Germán, Puerto Rico, who became blind and almost completely paralyzed while in college and is now devoting her talents and her energy to this job and to other Esperanto activities for the blind.

"Science", the weekly magazine of the American Association for the Advancement of Science, printed an informative report on Esperanto by Dr. Ivy Kellerman Reed, in its issue of December 23, 1960. It mentions the Universal Esperanto Congress and the International Summer University in Esperanto, both held in Brussels last August, the teaching of Esperanto in the schools, the Esperanto programs of the Voice of America, and the activities and achievements of the International Association for Esperanto in Science (ISAE, Internacia Scienca Asocio Esperantista).

ESPERANTO NEWS NOTES

Esperanto in Puerto Rico. Interest in Esperanto is steadily increasing in San Germán, P. R., especially at the *Interamerican University* and to some extent also at the *Agricultural & Mechanical College*. Under the experienced and expert guidance of *Dr. Mario A. Agrait Marty*, a group of enthusiastic students and graduates are promoting an Esperanto Club at the university. Among the most active students are *Miss Irma E. Báez* and *Miss Sara Hebé Lugo*; and a graduate of the university, *Miss Claudette Toro*. They have secured *Madame Rubicek*, head of the Dept. of Foreign Languages, as their faculty adviser. *Dr. Agrait Marty* spoke before a group of students on February 15th, and plans are going ahead for a lively club through the Spring term. The textbook will be "Esperanto: The World Inter-language" and all who participate will be members of the EANA.

Eula H. Fritz, Key West, Fla., joined the Association, studied Esperanto, but found no Esperantists in her area for practice and 'samideaneco'. She set about to interest friends and acquaintances in Esperanto, and as a result we have new members due to her promotion. We are happy to announce also that *Miss Fritz* has just gained the "Atesto pri Lernado" given by EANA for successful completion of that examination. She now looks forward to teaching Esperanto as a further step in promotion.

Radio Officer Joseph H. Casto, who sails the "seven seas" for a steamship corporation with headquarters in New Orleans, has recently joined the *Sustaining Board of EANA* (see inside front cover of this issue). Not satisfied with this support for the regular functioning of the Association, he makes a further contribution of \$100 to place AE in as many libraries as possible throughout the nation. We hope to report on results at a later date, but we now wish to point out to other members the importance of following his example for the support and extension of a knowledge of Esperanto in America. Let's all "pitch in and help" in these endeavors.

Funk & Wagnalls Company, New York. Through the good offices of EANA, this important publishing concern is now contributing copies of "The New International Yearbook" to the *Internacia Esperanto-Muzeo en Wien*, the great library and museum of everything pertaining to Esperanto, located at Vienna, Austria. "The New International Yearbook", published by the Funk & Wagnalls Company, is perhaps the most important yearly encyclopedia in America; and its article on *ESPERANTO* is definitely the best. It is written and revised each year by *Dr. William Solzbacher*, member of the "Akademio de Esperanto", and former President of the EANA. (In the next issue of AE, see comparisons among encyclopedias with respect to their treatment of Esperanto in articles on the subject.)

Esperanto in Springfield, Mass., continues to flourish under the able assistance of *Warren H. Gould* and his associates. Among several Esperanto classes reported are the *High School of Commerce*, and the class sponsored by the YMCA at the *Western New England College* — this recent new group is taught by *Arland R. Meade*, managing editor of the "Eastern States Cooperator." Club activities and exhibits of Esperanto in public libraries and elsewhere continue in the Springfield area. Truly exemplary promotion of Esperanto.

Esperanto Teachers and Courses in and near the Greater New York area: *Dr. Julius Balbin*, Professor of languages at the U. S. Merchant Marine Academy, weekly Esperanto classes on Sunday for the "Polyglots", in N.Y.C. *Doris T. Connor* and *Myron R. Mychajliw* at *Bryant Adult Center*, Bryant H. S., Long Island City, N.Y., continue weekly courses for beginners and advanced. *Don W. Hoffman* at the *N. J. Bell Telephone Co.*, in Newark, 10 young women employees, weekly Esperanto lessons, at the offices of the company. *Stanley Otto*, for the *New Jersey Esperanto Association*, at the YMCA in Orange, N.J. *John Schilke* with the assistance of *Charlotte Kaidy*, Chairman of the Education Committee of the National Secretaries Association, Danbury, Conn., with 9 students. *Sukceson al ĉiuj.*

Pastor Marlin Ballard, of the Christian Naturalist Church, Baltimore, Md., sends an announcement of Esperanto classes beginning in March for his parishioners. "Esperanto: The World Interlanguage" is the textbook.

Richard Sexton, student at the Wisconsin State College (Whitewater), is acquainting his college and the entire area where he lives with the fact that Esperanto is a vital living force to be reckoned with. An excellent editorial in the college journal "Royal Purple" advances his endeavors for a local club. He sends new members to EANA, and in every way possible promotes Esperanto unceasingly and well.

Operas given in Esperanto. From *Julius Mattfeld*, a professional writer in New York City, we received the following information and request: "With reference to Suppé's German operetta 'Die Schöne Galathea' (The Beautiful Galatea), I send you, for your files, the details of a performance in Esperanto, which I am including in a dictionary of Opera in the United States, as a new edition of an earlier book published by the New York Public Library. The operetta was given in Chicago, in the auditorium of the YMCA, on July 23, 1914, in a translation by A. D. Schefer, as 'Belega Galateo.' If you know of any other performances in the United States of operas given in Esperanto, I would appreciate the information." Can any of our readers add to the list of operas given in Esperanto in the USA?

Our deceased members: It is with sorrow that we report the passing of the following members of EANA: *Jewell Bainbridge*, whom many of us remember as a veritable "jewel" in the movement, died following an operation at Oklahoma City, Okla., at the age of 98. *Martha C. Heide*, beloved elderly Esperantist at Milwaukee, Wis., whom we last saw at the Golden Jubilee Congress of EANA in 1955. *Abram Moisevan*, loyal veteran of EANA in San Francisco, Calif. *James F.L.S. Matthews*, became an Esperantist in 1958, passed away in Dallas, Texas. *Pacon al ili.*

(*Dez. Kor.*) *Usono*. S-ro Paul Reichert, 316 East 12 St., *Rolla*, Mo., USA, studento en kolegio, 20-j., kaj dek aliaj membroj en kolegia Esperanto-klubo *dez. kor.* kaj interŝanĝi per I, PK, PM, kun ge-Esperantistoj tra la tuta mondo. Montru al la kolegio ke Esperanto vivas. Skribu multnombro. Ni certe respondos.

(*Anonco*) Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando. Skribu klare viajn nomon kaj adreson.

KANTO PRI HIAVATA

Henry W. Longfellow


Tr. Ernest G. Dodge

(Jen la kvara parto de la poemo, kiu komenciĝis en AE, N-ro 2, 1960.)

Kanto VIII

Fiŝkaptado de Hiavata

Foren sur la Giĉe-Gumi,
Sur la brila Grandmar-Akvo,
Kun fiŝkapta ŝnuro sia
El tordita cedroŝelo;
Foren kapti sturgon, Nahma,
Miŝe-Nahma, Fiŝo-Reĝon,
Ekvojaĝis Hiavata
En kanoto betulŝela,
Ĝoj' en brusto, tute sola.
Tra la tre klarega akvo,
Vidis li la fiŝojn naĝi
Tre profunde en la akvo;
Vidis flavan perkon, Sahva,
Kvazaŭ sunon en la akvo;
Vidis kankron, la Ŝaŭgaŝi,
Kvazaŭ araneon sube
Sur la blanka, sabla fundo.
En kanoto Hiavatâ
Sidis, tenis cedroŝnuron;
Tra la plumoj sur la kapo
Frumatena vento ludis,
Kvazaŭ tra l' branĉar' de cugo.
Sur la pruo de l' kanoto
La sciuro, Aĝidaŭmo,
Sidis – vosto en aero;
Tra peltharoj vento ludis,
Kvazaŭ tra la stepa herbo.
Sur la blanka, sabla fundo
Kuŝis sturgo, Miŝe-Nahma,
Granda Reĝo de la Fiŝoj;
Tra la blankoj spiris akvon;
Per naĝiloj malrapide
Li sin ventumadis; kaj per
Vosto fundon li balais.
Tie li en plenarmaĵo
Kuŝis – ŝildoj ambaŭflanke,
Sur la frunto ostaj platoj,
Sur la flankoj kaj la dorso
Ostaj platoj kun pikiloj.
Per militaj koloriloj
Estis li pentrita, strioj
Flavaj, ruĝaj, kaj lazuraj,
Punktoj brunaj kaj zibelaj;
Tiel kuŝis li sur fundo,
Sin ventumis per naĝiloj,
Kiam supre Hiavata



Venis en kanot' betula,
Kun la ŝnur' el cedroŝelo.
"Prenu la logaĵon mian!"
Tiel kriis Hiavata,
"Prenu ĝin, ho Sturgo, Nahma!
Ni komparu nian forton!"
Kaj la ŝnuron cedroŝelan
Li faligis en la akvon;
Vane por respond' atendis,
Longe sidis, atendente,
Ripetante pli laŭtvoĉe,
"Prenu la logaĵon mian,
Vi, la Reĝo de la Fiŝoj!"
Restis Nahma sen moveto,
Ventumante sin en akvo,
Hiavata'n rigardante,
Aŭskultante vokon, bruon,
Nenesan voĉtumulton,
Ĝis la krioj lin lacigis;
Diris li al la Kenozha,
Al ezoko, Maskenozha,
"Vi japrenu la logaĵon
De krudulo Hiavata,
Kaj disrompu lian ŝnuron!"
En la fingroj Hiavata
Sentis ŝnuron fortiriĝi.
Tiel forte ĝi tiriĝis,
Ke kanoto vertikale
Ekstariĝis en la akvo,
Kiel betultrunko staris,
Dum sciuro, Aĝidaŭmo,
Lude saltis sur la supro.
Kun indigno Hiavata
Vidis fiŝon supreniri,
Vidis ĝin proksimen veni.
La ezokon, Maskenozha,
Do li kriis tra la akvo,
"Esa! Esa! honto al vi!
Vi nur la ezoko estas,
Ne la fiŝ' de mi celata,
Ne la Reĝo de la Fiŝoj!"
Ŝanceliĝe, hontigite,
Alfundiĝis la ezoko,
Kaj la sturgo, Nahma, vokis
La sunfiŝon, Ugudvaŝo,
"Vi japrenu la logaĵon
De la fanfaronemulo,
Kaj disrompu lian ŝnuron!"
Haltetante, briletante,

Kvazaŭ luno en la akvo,
 Malrapide supreniris
 La sunfiŝo, Ugudvaŝo,
 Kaptis ŝnuron furioze,
 Tiris ĝin per tuta pezo,
 Faris kirlon en la akvo,
 Cirkle tiris la kanoton,
 En plaŭdantaj kirloj tiris,
 Ĝis ondcirkloj sur la akvo
 Sablan lagobordon tuŝis,
 Gis la junkoj kaj iridoj
 Kapkliniĝis ĉe lag-rando.

Tamen kiam Hiavata
 Vidis la sunfiŝon veni,
 Suprenveni tra la akvo,
 Vidis ĝian brilan diskon,
 Li kriegis mokridege,
 "Esa! Esa! honto al vi!
 Vi nur Ugudvaŝo estas,
 Ne la fiŝ' de mi celata,
 Ne la Reĝo de la Fiŝoj!"
 Kvazaŭ blanka fantomaĵo,
 Alfundiĝis ŝanceliĝe
 La sunfiŝo, Ugudvaŝo;
 Kaj denove sturgo, Nahma,
 Aŭdis krion kaj defion
 De persista Hiavata,
 La tumulton nenecesan
 Sonorantan sur la akvo.

De la blanka, sabla fundo,
 Sturgo, Nahma, sin eklevis
 Kun kolera gesto, kaj kun
 Tremo tra la nervofibroj,
 Klakigante ostajn platojn,
 Brila kun militkoloroj;
 Li kolere suprensaltis,
 Brilegante en sunbrilo;
 La buŝegon li malfermis
 Kaj englutis Hiavata'n,
 Lin kaj la kanoton lian.
 Kapantaŭen Hiavata
 Plonĝis en kavernon nigran,
 Kiel ŝtupo sur rivero
 Plonĝas tra la rapidaĵoj;
 Li sin trovis en mallumo,
 Palpis per la manoj, mire
 Kaj senhelpe, ĝis li sentis
 Grandan koron pulsadantan
 Ritme en mallumo ega.

Ĝin li batis en kolero,
 Batis koron de la sturgo,
 Sentis Reĝon de la Fiŝoj
 Tremi tra la nervofibroj,
 Aŭdis la plaŭdantan akvon,
 Kiam stumble tra ĝi saltis



Nahma, kore mortmalsana,
 Senpoveca kaj lacega.

Tiam Hiavata tiris
 La kanoton, ĝin li metis
 En transversan pozicion,
 Por ke li el la makzeloj,
 Dum tumulto kaj konfuzo,
 Ne elŝprucu kaj pereu;
 Kaj sciuro, Aĝidaŭmo,
 Gaje saltis kaj babilis,
 Laboregis kaj tiregis
 Por helpadi Hiavata'n,
 Ĝis finiĝis la laboro.


Tiam diris Hiavata,
 "Ho sciuro, amiketo!
 Brave vi por mi laboris;
 Havu mian dankon, prenu
 Nomon kiun mi nun donas;
 Poste, porĉiame, knaboj
 Vin nomados Aĝidaŭmo,
 'Vosto-en-aero' nomos."

Ree tremis sturgo, Nahma,
 Spasme spiris en la akvo,
 Tiam silentiĝis, floris,
 Ĝis gratiĝis li ĉe bordo;
 Hiavata aŭskultante
 Aŭdis lin gratiĝi sur la
 Borda sablo kaj ŝtonetoj;
 Sentis, ke li fikse restis,
 Sciis, ke la Fiŝoreĝo
 Kuŝis morta sur la sablo.

Tiam aŭdis Hiavata
 Kunfrapadon kaj klakadon
 De flugiloj kuniĝantaj,
 Aŭdis kriojn de konfuzo,
 Kvazaŭ rabobirdoj luktas,
 Vidis super si lumstrion
 Tra la ripoj de la Nahma,
 Vidis la okulojn brilajn,
 De enrigardantaj mevoj;
 Aŭdis ilin diri kune,
 "Jen la frato, Hiavata!"

Do kriadis li el sube,
 Ĝoje vokis el kavaĵo,
 "Mevoj, ho! ho miaj fratoj!
 Mi mortigis sturjon, Nahma;
 Pligrandigu la fendetojn,
 Plilarĝigu la trueton,
 Per la ungoj ĝin vastigu.
 Liberigu min, ho mevoj,
 El ĉi tiu mallumega
 Loko de mallibereco;
 Kaj postnune kaj ĉiame
 Homoj vin Kajoŝk' nomados,
 Mevoj, 'Noblaj Gratemuloj'!"

Do la bruegemaj mevoj,
 Per la bekoj kaj la ungoj
 Kunlaboris, pligrandigis
 Fendojn en la fiŝoripoj;
 Kaj el la karceri riska,
 El ventrego de la sturgo
 Kaj danĝero de la akvo,
 Liberigis Hiavata.



Staris li ĉe la vigvamo
 Sur la bordo de la lago,
 Kaj li vokis al Nokomis,
 La maljunulin', Nokomis,
 Fingromontris al la sturgo
 Nun senviva sur ŝtonetoj,
 Kun la mevoj lin manĝantaj.

"Mi mortigis Miŝe-Nahma,
 Reĝon de la Fiŝoj, Nahma!
 Vidu! mevoj lin manĝadas,
 Mevoj, la amikoj miaj.
 Ĝenu ilin ne, Nokomis,
 Ĉar min ili vere savis
 De danĝero ja grandega
 En la korpo de la sturgo.
 Do atendu vi ĝis kiam
 Ili estos satmanĝintaj
 Kaj la kropojn plenigintaj,
 Ĝis je sunsubiro, hejmen
 Ili flugos al la marĉoj.
 Tiam viajn potojn portu,

Kaj pretigu por la vintro
 Multe da oleo por ni."
 Ĝis vespero ŝi atendis,
 Ĝis la luno, Noktosuno,
 Levis sin sur paca lago,
 Ĝis Kajoŝk' plensatigitaj
 De l' festen' forflugis brue
 Trans ĉielo fajroruĝa,
 Flugis al insuloj foraj,
 Al la nestoj inter junkoj.

Iris dormi Hiavata,
 Kaj Nokomis al laboro,
 En lunlumo pacience
 Laboranta ĝis la suno
 Kaj la luno ŝanĝis lokon,
 Ĝis la ruĝa sunleviĝo
 Pentris la matenĉielon,
 Kaj la mevoj malsatantaj
 Realvenis de insuloj
 Por bruega matenmanĝo.

Tri tagnoktojn alternante
 La maljunulin', Nokomis,
 Kaj la mevoj fortiradis
 Sturgo-karnon oleričan,
 Ĝis la ondoj tra la ripoj
 Plaŭde fluis, kaj la mevoj
 Ne plu venis; ĝis sur sablo
 Kuŝis nur skeleto de la
 Reĝo de la Fiŝoj, Nahma.



DEZIRAS KORESPONDI



- Francujo.* Paul Loubic, instruisto, Route de Carcassonne, *Narbonne* (Aude), France. Dez. kor. kun usona instruisto por starigi amikajn rilatojn inter knaboj (14-j.) de niaj klasoj, informojn pri niaj du landoj.
- Kanado.* Wm. Shevkenek, instruisto, *Dauphin*, Man., Canada, dez. kor. PK, PM, por geknaboj en altlernejo. Tutmonde skribu kaj sendu bildojn.
- Turkujo.* F-ino Figen Ertekin, Yazgan sok., Birkan Apt. No. 11, *Iccebeci-Ankara*, Turkey, 15-j. gimnazianino dez. kor. il-PK, PM, kaj muziko.
- Usono.* S-ro Leon Baden, 2516A Green St., *Harrisburg*, Pa., 39-jara, ĵurnalisto, nova lernanto de Esperanto, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj.
- Usono.* Henry Bohus, 4647 Timuquana Rd., *Jacksonville 10*, Fla., 49-j., dez. kor. kun Usonanino pri sociologio, edukado, veljaĥtoj, vojaĝoj, k.s.
- Usono.* Donald W. Hoffman, 2540 Blvd., *Jersey City 4*, N.J., instruas Espkomencantojn, kiuj dez. kor. tutmonde, ĉiuj temoj, per l. kaj PK.
- Usono.* Wm. R. Neal, 1043 W. 60 Place, *Los Angeles 44*, Calif., 38-j. fraŭlo, bankisto, dez. kor. tutmonde, antropologio, historio, filologio, filozofio.
- Usono.* David L. Skidmore, 727 E. Webster, *Springfield 2*, Mo., 21-j. stud., dez. kor. kun homoj samaĝaj en Israelo, Hindujo, kaj Afriko, ĉiuj temoj.
- Usono.* F-ino Diane Williams, 1 Summit Dr., *Wayne*, N. J., 10-j. komencanto, dez. kor. kun geknaboj samaĝaj tutmonde per l., il-PK. Certe respondos.
- Universala Amikeco* per korespondado kaj interŝanĝado! Bonvolu anonci senpage en dumonata organo de "*Universala Amikeco*", Box 1960R, GPO *Melbourne, Australia*. Jarkotizo: \$1. Nestampitaj PM akceptataj.

"SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

Tells You What to Say and How to Say it!

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5¼ x 3½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

It is a thoughtful, useful gift for friends, too!

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.

Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.



only
75¢

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower — dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.